Kiew, Malo-Vladimir-
skaja, 26 (Russia)

Tre estimata Sinjoro!

Mi havas la honoron komuniki al vi, ke de preskaŭ 2 jaroj mi kolektas materialojn por verko, kiun fine nun, mi juĝis ebla komenci.

Tiu verko estos historio kaj analizo de la plej novaj projektoj de L. I. <u>a posteriori</u> (kaj ankaŭ tiuj el ili, kiuj ne estas troveblaj en „Histoire de la L. U." & „Les Nouvelles L. I." de Couturat & Leau.

Inter aliaj estos analizataj:

Adjuvilo, Antido, Ausiliar, Auli, Ido, <u>Interlingua</u>, Lingue, Lingua Interpres, Nove Latin, Omnez, Perfect, Reform-Ido, Romanal etc, etc...

Estos recenzataj ankaŭ la interlingvistaj gazetoj.

Tial mi petegas Vin, ke vi sendu al mi ĉiom, kio ŝajnos al Vi necesa, por ke mi povu bone kaj ekzakte skribi mian ĉapitron pri „Interlingua".

Ankaŭ mi tre petas, ke Vi sendu al mi sciigojn (nomojn de verkoj, adresojn de Aŭtoroj) pri malpli konataj L.I.-aj (ekz. pri Semi-latin, Novlatin, Mezvoyo ... mi absolute nenion scias).

Estimata Sinjoro! Ĉu vi havus la afablecon skribi al mi leteron en kaj pri Interlingua, por ke mi ĝin citu kiel specimenon de tiu-ĉi lingvo?

Kun granda Estimo

Cz. Kozlowski

Russia, Kiew, Malo-Vladimirska, 26

Mi tre petas, ke Vi enpresigu en Via estimata ĵurnalo „Discussiones" la sekvantan alvokon.

Kun antaŭdanko

Cz. Kozlowski

---

## ALVOKO

### al chiuj interlingvistoj.

Intencante verki filologian laboron pri plej novaj L.-j I.-aj a posteriori, mi petas chiujn Aŭtorojn de tiaj lingvoj sendi al mi librojn, revuojn, prospektojn, leterojn k.t.p. pri k en iliaj lingvoj. Kun sincera antaŭdanko

Cz. Kozlowski

Russia, st. Olshanica Kiewsk. gub., Selo PRUSY.

R. 7.VI.1911

D 1.12, e prom. D 2.1.2